

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

aŭgusto / septembro / oktobro 1991



## Münster invitas la 44an IFEF-Kongreson



## Münster invitas la 44an IFEF-Kongreson

1992 estas jubilea jaro, ĉar FISAIC, la Internacia Federacio de Kulturflugantaj Fervojistoj, estas fondita antaŭ 40 jaroj. Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), grava kultura branĉo en la Socialorganizaĵo de Germana Federacia Fervojo (BSW) ĝojas, ke la 44a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso okazos en Germanio. Münster, malnova nordgermana urbo, atendas kelkcentojn da esperantistoj inter la 16a kaj 22a de majo 1992. FISAIC protektos la aranĝon.

Münster gastigis jam antaŭ 30 jaroj la membrojn de GEFA okaze de ilia 6a jarkunveno. Intertempe la ekstera aspekto de la kongresurbo ankoraŭ plibeligiĝis. Ankaŭ la graveco de la fervoja nodo kreskis, kvankam la fervoja direkcio devis ĉesi al ekonomiaj postuloj. La kongresanoj loĝos en pensionoj kaj hoteloj situantaj grandparte en la historia urbokerno, plena da vidindaj konstruaĵoj, profanaj kaj ekleziaj. Ili vizitos la faman salonegon en la gotika urbodomo, en kiu la pacokontraĵo estas subskribita en 1648 inter Hispanio kaj Nederlando. Aŭ la gigantan katedralon kun sia astronomia horloĝo. La kongresejo situas en la foirejo, unu kilometron for de la stadiodomo, kaj estas facile atingebla ek de la urbocentro per tri aŭtobuslinioj. Posedantoj de propra aŭtomobilo trovas senprobleme lokon por parki apud la kongresejo. Cetere por atingi Münster per fervojo necesas por germanoj nur kelkhora veturado. Do grava avantaĝo por tiuj, kiuj timas longajn vojaĝojn.

La kongresa programo multilate similas al tiu de antaŭj kunvenoj. Tamen ĝi entenas specifajn elementojn, ekzemple en la teatra, distra aŭ koncerta vesperoj. La tuttaga ekskurso kondukos norden. Sur testoto

trako trafikos, pli precize ŝvebas prototipo de la magnetrajno Transrapid. Domaĝe, ke la kongresanoj ne rajtas mem travivi la maksimuman rapidecon de 500 km/h. Kiu scias, ke en la regiono ĉirkaŭ Münster abundas je advokatestoj. Multaj ili apartenas al aristokratoj. Dum la duontaga ekskurso oni vizitos sur diversaj vojoj minimume du advokatestojn. Kroma unikaĵo estas, ke la postkongreson organizos niaj orientgermanaj gekolegoj. Bonega okazo por konatiĝi kun parto de Germanio, kiun kelkiuj ĝis nun ne konas.

Tiu 44a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) estos la tria kaj por multaj jaroj la lasta aranĝo okazonta en Germanio. GEFA atendas multnombrajn eksterlandanojn, sed ĝi apelacias precipe al la germanaj fervojistoj, iliaj familiaj kaj aliaj amikoj de la Internacia Lingvo ĉeesti en Münster. Aliĝiloj jam estas disdonitaj. Aliaj ekzempleroj estas haveblaj per la konstanta adreso "44a IFEF-Kongreso, Postfach 10 04 30, D-W-6360 Friedberg, Hessen". Cetere bv. atente legi la informojn de LKK en la federacia organo "Internacia Fervojisto". Do ĝis revido en majo 1992 en Münster!

W. B.

## Internationaler Kongreß in Münster

**FISAIC, der Internationale Verband kulturpflegender Eisenbahner, blickt auf 40 Jahre fruchbarer Tätigkeit zurück. Im Rahmen dieses Jubiläums lädt die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) die Freunde der Internationalen Sprache nach Münster (Westf.) ein. Dieser 44. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) findet traditionell im Frühjahr statt, und zwar vom 16. bis 22. Mai 1992.**

Die Veranstalter haben sich einen geschichtsträchtigen wie auch attraktiven Kongreßort ausgesucht, der zudem über günstige Bahnverbindungen zu erreichen ist. Tagungsstätte ist die moderne Münsterlandhalle auf dem Messegelände. Die meisten Teilnehmer werden im Stadtzentrum wohnen. Hierfür stehen je nach der gewählten Kategorie genügend Pensionen und Hotels zur Verfügung.

Der fränkische Kaiser Karl der Große war es, der Ende des 8. Jahrhunderts ein Kloster gründen ließ, um die westlichen Sachsen zu missionieren. Die Bischöfe wurden bald zu Landesfürsten und blieben es bis in das 19. Jahrhundert. Daneben entwickelte sich eine Kaufmannssiedlung. Münster, seit dem 12. Jahrhundert eine befestigte und wohlhabende Stadt, erhielt eine führende Rolle bei den westfälischen Städtebündnissen und in der Hanse. Kaufleute und Gilden errichteten neben den bestehenden

kirchlichen Bauten prächtige Bürgerhäuser und Adelshöfe. Berühmt ist die gotische Fassade des Rathauses. Sie erscheint übrigens, zusammen mit dem IFEF-Emblem, auf der Klagebemarke dieses Esperanto-Kongresses. Die Tagungsteilnehmer werden im Rathaus den getäfelten Saal besichtigen, in dem der Teilfriede zwischen Spanien und den Niederlanden 1648 unterzeichnet wurde.

Die napoleonische Epoche brachte das Ende des alten Fürstbistums. Das ehemalige Schloß wurde zur Universität, die mittelalterlichen Befestigungsanlagen wichen gepflegten Promenaden. Münster wurde die Hauptstadt der neugebildeten Provinz Westfalen. Während des letzten Krieges wurde das Stadtzentrum größtenteils zerstört, jedoch beispielhaft wieder aufgebaut, so der gewaltige romanisch-gotische Dom mit seiner astronomischen Uhr, das erwähnte Rathaus oder der barocke Erbdrostenhof.



Die Teilnehmer werden viele dieser Sehenswürdigkeiten besuchen. Sie werden aber auch mit Neuerungen bei den europäischen Bahnen bekanntgemacht. Besondere Arbeitskreise befassen sich mit der Vorbereitung von Fachvorträgen und der Fortbildung von Fachwörterstimmungen. In mehreren Arbeitssitzungen werden organisatorische Fragen behandelt und die kommenden internationalen Veranstaltungen abgestimmt. Alles in Esperanto – versteht sich.

Das weitgefächerte Programm läßt auch Zeit für Theater, Konzert und gesellschaftliche Veranstaltungen. Wichtig sind die persönlichen Gespräche unter den Esperantisten der verschiedenen Länder. Dabei gibt es keine Verständigungsprobleme. Von den zahlreichen Wasserschlössern in der Umgebung werden auf einem Busausflug mindestens zwei besucht, wobei jeder Bus andere Ziele ansteuert. Der ganztägige Ausflug führt nach Norden, ins Emsland. Dort zieht auf einer Versuchsstrecke der Transrapid in rasanter Schwebefahrt seine Kreise. Leider ist die Mitfahrt bei 500 km/h nicht zugelassen. Dafür lohnt auch der Besuch einer Mühle, die sowohl mit Wasser- als auch mit Windkraft betrieben wird.

Dieser Esperanto-Kongreß wird zweifellos zu einem eindrucksvollen Erlebnis werden. Er wird zum dritten Mal nach dem Krieg in Deutschland veranstaltet. Wir sollten uns daher die Teilnahme nicht entgehen lassen und zeigen, daß Esperanto mehr ist als nur eine Freizeitbeschäftigung. Anmeldevordrucke sind beim zuständigen Bezirksbeauftragten für Esperanto erhältlich, außerdem über die Anschrift "44a IFEF-Kongreso, Postfach 100430, D-W-6360 Friedberg (Hessen)". Beachten Sie auch die Informationen, die im Verbandsorgan "Internacia Fervojisto" erscheinen. Dort finden Sie auch Einzelheiten über den nachfolgenden Nachkongreß in Ostdeutschland.

W. B.



44.

## IFEF-Kongreß 16. - 22.5.1992 in Münster

Bitte beachten Sie die Informationen im "Internacia Fervojisto" Nr. 5/91 und folgenden

Anmeldevordrucke lagen bereits unserem BULTENO Nr. 3 bei; weitere sind zu haben über die Anschrift „44a IFEF-kongreso, Postfach 100430, W-6360 Friedberg (Hessen)“ oder per EDS: W. Ullmann, P 2103, ZZA 6500 Mainz.

Die sehr ansprechenden selbstklebenden **Briefverschlusmarken**, die das obige Kongreßblem dreifarbig zeigen, sind beim LKK-Kassierer zu haben. 1 Bogen mit 16 Marken kostet einschl. Versandkosten 5,— DM. Bitte überweisen Sie den Betrag auf folgendes Konto, und vermerken Sie den Zweck im Überweisungsvordruck: **E. Herlitze, 44. IFEF-Kongreß Münster, Sparda-Bank Köln (BLZ 37060590), Konto 100068675.**

Das Programm ist reichhaltig und verspricht neben einem vielseitigen fachlichen Inhalt interessante Ausflüge (u. a. zur Magnetbahnanlage Transrapid) und einen abwechslungsreichen kulturellen Teil.

Melden Sie sich bitte bald an, dann sind Sie bei den preisgünstigen Unterkünften dabei. Beweisen Sie unseren und Ihren ausländischen Freunden, daß wir uns auf ihren Besuch in Deutschland freuen.

Die Informationen im "Bulteno" Nr. 3 Seite 7 und im "Internacia Fervojisto" Nr. 4 Seite 63 sind überholt.

LKK

**BERICHTIGUNG:** Die im Bulteno 3/1991 auf Seite 6 besprochene Novelle hat den Titel: "Mozela vojaĝo amoflikto" (nicht amkonflikto).

## Willi Barnickel sepdek jarojn

Denove unu el niaj plej vervaj kaj fidelaj kunlaborantoj atingis la biblian aĝon de sepdek. La duan de septembro li festis tiun gravan vivjubileon, pro kiu la GEFA-estraro kaj -membraro tutkore gratulas.

Jen ni iom skizas lian esperantistan vivon. Jam komence de la kvindekaj jaroj li estis aktiva en sia tiama loĝregiono en Rhönmontaro. Sed la unuan grandan servon al GEFA li konsentis fari, kiam li transprenis la taskojn "Informado, varbado" en la nova GEFA-estraro la unuan de januaro 1957, kiujn li prizorgis por la daŭro de dek jaroj. Tiam la Federacia Fervojo iom post iom eldonis 8 Esperanto-lingvajn varbprospektojn, en kies tradukado li intensive kunlaboris. Al liaj klopodoj oni ankaŭ povas danki, ke ĝis la nuna tempo multnombraj anoncoj ĉefe pri fervojaj rabatoj aperis en la UEA-jarlibroj. Sed same li ĉiam denove sukcesis aperigi reklamojn en oficialaj informiloj de DB pri eblecoj, kiujn ofertas la Internacia Lingvo (Pasporta Servo). Kaj ni ne preterfidu, ke ofte liaj ideoj konstrue kontribuis en kreado de glumarkoj kaj aŝiĝoj.

Barnickel aktive partoprenis en la speciala fervojista teamo en la Universala Kongreso Mainz (1958). En LKK de IFK Fulda (67) li estis vicprezidanto, en IFK Regensburg (81) li transprenis la fakon "informado", kaj nun

trian fojon li estas LKK-ano por IFK Münster kun la sama tasko. Kelkfoje li kunlaboris en starigo de IFEF-statuto. Tamen tio ne estas ĉio. Li plurfoje tradukis Internaciajn konvenciojn pri la pasaĝer- kaj frajtrafiko, kio signifas aparte valoran, eĉ internacie agnoskitan agadon. Fine ni menciuj, ke li ĉiam estis kaj estas preta, transpreni "specialan taskon".

La supre dirita neniel povas montri la tutan dimension de tio, kion Willi Barnickel faris por GEFA kaj IFEF, sed ankaŭ por la Internacia Lingvo entute. Restas al ni nur, diri "Dankon, kara Willi! Vi donis vian fidelecon al nobla afero." Kaj ni alrokčas la deziron, ke vi havu ankoraŭ multajn jarojn en bona sano kune kun via estimata edzino, kaj ke multaj el viaj fortoj ankaŭ estonte apartenos al GEFA.

la prezidanto

## Fervojaj novaĵoj

**Bonn:** La registara komisiono de Germanio proponos fine de 1991 transformadon de la nuntempaj du germanaj fervojoj, DB kaj DR, en unu Germanan Fervojan Akcian Kompanion (DEAG) tiucele fondotan. Antaŭkondiĉoj por tiu strukturreformo estos modifo de la federacia konstitucio, konsekvenca separigo de ŝtataj kaj entreprenaj taskoj, apartigo de relaro kaj ekspluatado kaj transpreno de la ĝisnunaj ŝuldoj.

**Prago/Varsovio:** Ek de la 1a de julio 1991 provizore estas malfermitaj por la pasaĝertrafiko sekvaj fervojaj transitlinioj:

- Ebersbach (Sachs) - Rumburk (DR - ČSD),
- Johanngeorgenstadt - Potučky (DR - ČSD),
- Pasewalk - Szczecin/Stettin (DR - PKP),
- Kietz - Kostrzyn/Küstrin (DR - PKP).

**München:** La nova giganta varstacio München Nord ekfunkcias de post la 26a de septembro 1991. Tiu ĉi disponas pri komence 40, poste 64 destinlokaj klasifiktrakoj. Ĉiutage povas esti novordigataj maksimume 5 300 varvagonoj plenaŭtomate direktataj de elektrona signalreĝejo. La ranĝstacioj München Ost kaj München Laim estos fermataj.

**Berlin:** Fervojan Kongreson okazintan la 4an kaj 5an de julio 1991 en Berlin partoprenis 350 reprezen-

tantoj de politiko, esplorado, scienco, industrio, fervojoj, federacioj kaj organizaĵoj el ĉiuj eŭropaj landoj. Ili diskutis pri la temo "Fervojoj - pioniroj por la estonteco de Eŭropa". Komisararo de la Eŭropa Komunumo prezentis sian projekcion, laŭ kiula ŝtatoj funde modifos la rilatojn al siaj fervojoj.

**Frankfurt:** Germana Federacia Fervojo (DB) dungas pli kaj pli kvalifitajn fervojistojn de la Germana Regna Fervojo (DR). Kaŭzo: Nehavigo de manovristoj, trajnakompanistoj, lokomotivistoj ktp. en certaj grandurboj. Tiuj fervojistoj, intertempe 2 000, ricevas surbaze de kontrakto por du jaroj la saman salajron kiel siaj DB-gekollegoj.

**Utrecht:** Pro la diferencaj teknikaj sistemoj ne eblas fabriki lokomotivon, kiu estas universale uzebla por la internacia pasaĝertrafiko kun granda rapido (super 160 km/h). Oni esploras la konstruadon de ICE-trakiilo ekipota por pluraj sistemoj. En la trafiko inter Nederlando kaj Germanio necesos ICE-trakiilo kun du sistemoj, inter Francio kaj Germanio tia kun eĉ kvar sistemoj krom reduktita larĝeco de ICE-vagonaro.

Kompil. el "Blickpunkt Bahn" 8/91 de W. B.

## ESPERANTO-FERNKURSUS II

EINZAHLEN + BESTELLEN BEI:

**Joachim Schrapp · Schmittingheide 17d**  
· W-4400 Münster

**SIE ERHALTEN:**

- » **Lehrbuch** » **briefliche Betreuung**
- » **Tonbandkassette** » **Korrekturen**
- » **15 Lehrbriefe** » **Beratung**

GEFA

**ESPERANTO flüssig sprechen zu können, ist ein ERLEBNIS · GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!**

KOSTEN: 40,-- DM · Postgiro · Konto 611 50-466  
· Dortmund · BLZ 440 100 46

KONVERSACIA  
KURSO

Viele Situationen des täglichen Lebens werden als Gesprächsstoff behandelt.

Damit erlangen Sie die Fähigkeit, eine allgemeine Unterhaltung führen zu können.

KONVERSACIA KURSO ist der Fernkursus!

Anschluß an:

»**ESPERANTO, eine lebendige Sprache**«

**Redaktfino por n-ro 5 estas la 10.11.91**

Herausgeber/eldonisto: Germana Esperanta Fervojista Asocio. Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, Sachsenstr. 7, 8620 Lichtenfels. Druck/preso: d.m-druck GmbH, Holsteiner Str. 80, W-2800 Bremen 1